


La 41-a konferenco de ILEI

DU A INFORMILO




Konferencejo

La 41-a ILEI-konferenco okazos en *Songhai Centro* — **Rue du Marché OUANDO, Quartier OUANDO, Porto Novo.**

Ĉifoje la konferencejo servos ankaŭ kiel tranoktejo.

Ni povos ĝui parkon ĉirkaŭ la Centro kaj tre bele pasigi liberan tempon.



Loĝdomo



Loĝdomo



Konferenchalo

Nepre bonvolu alporti bantukojn, ĉar la Centro ne havas ilin kaj ne liveras. Lokaj samideanoj informis, ke matracoj kutime estas kovritaj, sed ili mem kutimas alporti litotukojn, do bonvolu prizorgi ankaŭ tion. Nepre havu iujn rimedojn kontraŭ insektoj, kiujn Vi povos uzi por Via haŭto, Viaj vestaĵoj kaj por meti ĉe fenestro, ankaŭ ĉe lito.

PRISKRIBO DE LA PROGRAMO

Bonveniga servo — en flughaveno ĉiujn alvenatojn el aliaj kontinentoj atendas LKK-anoj

La 29an: posttagmeze alveno, enloĝiĝo; vespere registrado, *Interkona Vespere* kun diverslandaj manĝoj, alportitaj de konferencanoj.

La 30an: matene *Malfermo*, prelegoj, ekzamenoj (unua renkontiĝo); posttagmeze ekskurso DT1, konversacia rondo, ateljero, prelego; vespere *Nacia Vespere*

La 31an: matene ekzamenoj (testo), seminarioj; posttagmeze ekskurso DT4, seminario, Lingva Festivalo (pretiĝo), ateljero; vespere kultura programo.

La 1an: matene ekzamenoj (skriba parto), seminarioj; posttagmeze ekskurso DT3, seminario, Lingva Festivalo (pretiĝo), ateljero; vespere kultura programo

La 2an: seminario, Lingva Festivalo (pretiĝo); posttagmeze ekskurso DT2, ekzameno (parola parto), konversacia rondo ateljero; vespere kultura programo

La 3an: matene ekskurso TT, prelegoj, seminario (memstaraj taskoj); posttagmeze Lingva Festivalo (memstaraj taskoj), konversacia rondo, ateljero; vespere kultura programo.

La 4an: matene *Simpozio*; posttagmeze *Lingva Festivalo* (prezento), ĝenerala esembelo, *Fermo*; vespere *Bankedo*, *Internacia Vespere*

La 5an: matene adiaŭo, forveturo al postkonferenca ekskurso PE

Detala programo aperos en repaĝo de ILEI (<http://www.ilei.info/>) kaj en konferenca libro kun resumoj de prelegoj por la Simpozio kaj ĝenerala programo. Ĝi enhavos ankaŭ priskribojn de aliaj programeroj kaj kelkajn utilajn informojn.

ĜENERALE PRI LA PROGRAMO

Ĉiuj programeroj okazos en la konferencejo — **Songhai Centro**

Interkona (manĝ-)-vespere okazos la 29an de julio kune kun registrado kaj prezentiĝo de ĉiuj partoprenantoj.

Solenaĵoj: inaŭguro okazos **la 30an de julio** kaj transiros al ĝenerala programo. **Fermo** okazos **la 4an de aŭgusto**.

Simpozio okazos **la 4an de aŭgusto** matene. Ĝi traktos la konferencan temon, tamen iom pli vaste.

Lingva Festivalo okazos **la 4an de aŭgusto** posttagmeze. Dum ĝi ni konatiĝos kun diversaj naciaj lingvoj uzante Esperanton kiel lingvon-ponton. Ĉifoje iom alia ol kutime — okazos nenur la festivalo mem, sed ankaŭ speciala seminario por pretigi la festivalon. Ĝin gvidos Vladka Chvatalova el Ĉeĥio, kiu havas kelkjaran sperton pri aranĝo kaj gvido de la festivaloj.

Bankedo okazos **la 4an de aŭgusto** kaj estos fin aoficiala programero de la konferenco. Dum ĝi ni ĝuos specialaĵojn de afrika kuirarto.

Seminario: ĝin gvidos sperta instruistino Ana Montesinos de Gomis el Britio. Seminario traktos diversajn temojn pri instrumaterialo kaj lingvaj ludoj.

Ateljero: estas programero, destinita por komuna laboro verkante libreton laŭ la spirito de la speciala projekto DANIDA-UNESCO. Ĝin gvidos Jean-Pieree Boulet el Francio.

Ekzamenoj de ILEI/UEA, unu arenkontiĝo okazos la 30an de julio, elementa kaj meza niveloj, okazos la 31an de julio kaj la 1an, la 2an kaj la 3an ĉiam antaŭtagmeze. Ne perdu eblecon konvinkiĝi kiom bone vi konas la lingvon kaj konsultiĝi kun pli spertaj instruistoj. **B-landanoj ekzameniĝos senpage!** La sesion gvidos prezidantino de IEK Mireille Grosjean el Svislando.

Ĝenerala asembleo — renkontiĝo de la estraro kaj ĉiuj partoprenantoj por diskuti pri atingoj kaj planoj. Ĝi okazos la 4an posttagmeze.

Dum la konferenco vi povos ĝui **prelegojn** proponitajn de niaj samideanoj, partopreni **ekskursojn**, ĝui **kulturan programon**, kiu helpos pli bone ekkoni Afrikon de proksime.

Tagordo: ke Vi povu pli bone orientiĝi en la programo, jen neŝanĝeblaj programeroj: *matenmanĝo* je **8:00-9:00** *tagmanĝo* je **14:00-15:00** *vespermanĝo* je **19:00-20:00**. Duontagaj ekskursoj komenciĝos je la 15:00 h.



Laborĉambro



Dormĉambro



Parko

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Ĉiuj, kiuj venos antaŭ la konferenco, t. e. la 27an aŭ la 28an de julio povos ekloĝi en Songhai Centro. Tie oni ricevos ankaŭ manĝojn, depende de alventempo — kiuj venos antaŭtagmeze, ricevos tagmanĝon kaj vespermanĝon, kiuj venos posttagmeze sed ne tro malfrue — vespermanĝon kaj daŭre ĉiujn manĝojn en sekvaj tagoj.

Se iu volas resti en la Centro plian tagon — tio aranĝeblas (inkluzive manĝojn), nur bonvoli informi prezidanton de LKK Charles Alofa alofkarlo@yahoo.fr kaj estraron pri konferencoj Aida Ĉiĝikaitĉ aidute@mail.it.

Vian alven- kaj forir- tagon kaj horon bonvolu komuniki al prezidanto de LKK Charles Alofa alofkarlo@yahoo.fr kaj membro de LKK Sebastien Essou sandotour@yahoo.fr. Por invitilo bonvolu turni Vin al membro de LKK Jean Codjo jean_codjo@yahoo.com.

Taksio de flughaveno al Songhai Centro veturas ĉ. 1 horon kaj kostas ĉ. 40 EUR, (distanco inter Cotonou kaj Portonovo ĉ. 30 km). 1 EUR egalas al ĉ. 650 FCA.

Somere estas pluvsezono, do bonvolu kunporti ombrelon kaj maldikan pluvmantelon. Lokan monon Vi povos preni de banko aŭtomato per Vi abanko karto en flughaveno.